

Malkoloniigo kaj la krizo de energio

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 570, 1974.09.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la venontaj semajnoj ni ekzamenos kelkajn ŝanĝojn de sinteno, kiuj subite trudiĝas al la loĝantoj de la industriaj landoj. Ni konstatos, ke tiuj ŝanĝoj estas la neatenditaj konsekvencoj de la malkoloniigo en Azio, Afriko kaj Ameriko.

A.- Sed jen unue kelkaj enkondukaj klarigoj. Ĉiuj scias, ke la malkoloniigo jam komenciĝis antaŭ pluraj jardekoj. Tamen la ekskolonioj ekonomike daŭre dependis pli malpli longe de la eksmetropolo. Popola Ĉinio, per sia subita rompo kun la helpema Sovetio, esprimis la volon fariĝi absolute sendependa. La soveta helpo, kiel ĉiuj ceteraj helpoj al la tiel nomataj subevoluintaj aŭ ekevoluantaj landoj, ne estis komplete malprofitema.

Cl.- Popola Ĉinio tuj havis imitantojn. Pli kaj pli la registaroj de la aziaj, afrikaj kaj amerikaj ekskolonioj celadis ne nur firmigi la politikan sendependecon, sed ankaŭ la ekonomikan liberon. Sen ekonomika libero, politika sendependeco ne estas kompleta.

A.- La koloniaj imperioj estis bazitaj sur tiu ĉi principo : la industriigo disvolviĝu en la metropolo kaj la kolonioj fariĝu produktantoj de krudaj varoj. La industriaj produktoj vendiĝu plej multekoste, kiom eble, kaj la krudaj materialoj aĉetiĝu plej malmultekoste, kiom eble. El tio rezultas, ke en la metropoloj la vivnivelo senĉese altiĝas, dum en la kolonioj ĝi nur povas malaltiĝi.

Cl.- Britio ricevis lanon, viandon kaj laktaĵojn el Nov-Zelando pli malmultekoste ol el la najbaraj eŭropaj landoj. Usono posedis en Sudameriko ĉiujn energifontojn kaj minejojn. Francio eĉ devigis musulmanajn landojn produkti vinon. Sovetio sin ĉirkaŭis de ekonomike kaj ideologie dependaj satelitoj.

A.- Post la malkoloniigo oni ne tuj rimarkas ekonomikajn ŝanĝojn. Unue la ekskolonioj devas akiri internan ekvilibron. Ilia registaro troviĝas antaŭ gigantaj taskoj : lernejoj, stratoj nur ekzistas, kie tio profitis al la eksregantoj. Ĉiuj ŝtataj strukturoj devas esti repensataj. Eĉ lingva kaj teritoria ekvilibroj devas esti retrovitaj. Multe da laboro. Sed malabundas ne nur la mono, sed ankaŭ la kompetentaj gvidantoj. En la publika vivo ĝenerale regadas kutimoj hereditaj de la koloniismo : malhonesteco ĉefas inter ili.

Cl.- Tamen objektiva observado pravas, ke en ĉiuj ekskolonioj, kaj malgraŭ plej variaj reĝimoj, en dek jaroj de politika libereco okazis pli da pozitivaj ŝanĝoj ol dum jardekoj de kolonia regado : renaskiĝas la nacia fiero ; stratoj, lernejoj, fabrikoj kaj decaj loĝejoj konstruiĝas ĉie ; oni ekzorgas pri la kamparanoj ; oni ekprotektas la naciojn, kiuj devas elmigri por vivteni sin.

A.- Sed ŝanĝiĝoj ne nur okazas en la ekskolonioj. Ĝenerale ili ankaŭ markas la vivon en la eksmetropolo. Ofte centmiloj da forkurintoj el la kolonioj devas asimiliĝi en la origina lando. La industrio devas alfronti la konkurencon de alinaciaj samfakaj industrioj. Sed la ĉefa ŝanĝo estas psikologia. La eksregantoj devas malkovri en la eksregatoj egalulojn. Franco devas vidi en alĝeriano egalulon. Usonano devas vidi en kubano homon samrajtan. Soveto devas akcepti, ke ankaŭ ano de Popola Ĉinio eble pravas en sia interpretado de marksismo.

Cl.- Sed ne nur la metropoloj tiris profiton el la koloniismo. Ankaŭ la aliaj industriaj landoj estis intimaj profitantoj. Svislando kaj Nederlando per siaj bankoj posedas monopolon en multaj mondpartoj. Malkoloniigo signifas, ke iom post iom tiuj privilegioj malkreskos. Ekzistas en la eksmetropoloj sento pri kulpeco, kiu fine faciligas la rilatojn kun la ekskolonioj. En la aliaj industriaj landoj ne ĉiam ekzistas klara kompreno pri la propra respondeco. Germanoj kaj svedoj certe ne rigardas al la mizero de nigruloj kun samaj okuloj kiel belgoj kaj portugaloj. Tamen granda parto de la riĉeco de Germanio federala kaj de Svedio estas la rezulto de alies koloniismoj.

A.- Kondutŝanĝoj antaŭ ĉio estas la rezulto de ekonomikaj ŝanĝoj. La malkoloniigo iom post iom kondukis al videblaj financaj ŝanĝoj. La prezo de la benzino, de la sukero, de la oro kaj de multaj aliaj varoj atestas, ke ni ne plu vivas en la sama mondo. Pri ĉio tio ni parolos dum la venontaj semajnoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Cl.aude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), julio 2012